



Voĉoj de la Senvoĉuloj

Senŝualigi la realon de **homaj rajtoj**
en **Nord-Koreio**

우리 나라 사회주의 세도 만세!



Korean Institute for
National Unification



Voĉoj de la Senvoĉuloj

“

Senvualigi la realon de **homaj rajtoj**
en **Nord-Koreio**

”

Lee, Wootae

esplor-subvenciito, Korea Instituto por Nacia Unuigo

Lee, Kyu chang


supera esplor-subvenciito, Korea Instituto por Nacia Unuigo

Na, Yongwoo

esplor-subvenciito, Korea Instituto por Nacia Unuigo



Tiu ĉi raporto baziĝas sur la opinioj de la aŭtoroj kaj ne
nepre spegulas la oficialan opinion de la
Korea Instituto por Nacia Unuigo.



우리 나라 사회주의 제도 만 세 !

VI POVUS ELEKTI RIGARDI EN ALIAN DIREKTON,
SED VI NE PLU POVAS DENOVE DIRI,
KE TION VI NE SCIIS.

William Wilberforce
1759-1833

위대한 김일성 - 김정일

Apartan dankon al **Kang Dong-wan**, profesoro de Universitato Dong-a
Esperantan version produktis internacia grupo en 2024.



ENHAVTABELO

7

01

KOMPRENI
NORD-KOREION

17

02

ATENCOJ AL
HOMAJ RAJTOJ
SUB LA REĜIMO
DE KIM JONG-UN

55

03

**KLOPODOJ
DE LA INTERNACIA
KOMUNUMO**
PLIBONIGI LA SITUACION
DE HOMAJ RAJTOJ
EN NORD-KOREIO



Voĉoj de la Senvoĉuloj

Senvualigi la realon de homaj rajtoj
en Nord-Koreio

01

KOMPRENI
**NORD-
KOREION**



Voçoj
de la
Senvoçuloj

1 Kompreni Nord-Koreion

BAZAJ INFORMOJ PRI NORD-KOREIO



Mapo de
Nord-Koreio



Flago de
Nord-Koreio



Emblemo de
Nord-Koreio



**Korea
Popoldemokratia
Respubliko**

ĈEFURBO

Pyongyang



Areo

123,138km²



Loĝantaro

25,708,000

personoj
(2023)



Ekstera komerco

713

milionoj da usonaj dolaroj
(2021)

Eksporto: 82 milionoj da usonaj dolaroj
Importo: 631 milionoj da usonaj dolaroj

SUD-KOREIO

1,259 miliardoj da usonaj dolaroj
(2021)



**Reala laŭkapa malneta
enlanda produkto**

po **1,700**

usonaj dolaroj
(2015)

SUD-KOREIO

44,200 usonaj dolaroj
(2021)



**Kronika krizo
de manĝaĵoj**

La manko de manĝaĵoj
en 2022 estas taksata je

unu
miliono da tunoj
da greno



Homaj rajtoj

**“ la plej
malbona
en la
mondo ”**

Freedom House
marto 2023



**Libereco de la
amaskomunikiloj**

**“ severa regado
de informoj,
malpermeso de
sendependa
ĵurnalismo ”**

RSF
majo 2023



Religio

**“ arestoj
de kristanoj,
hejmaj
preĝejoj
fermitaj ”**

Open Doors
januaro 2023

KELKAJ ŜLOSILVORTOJ PRI NORD-KOREIO

JUĈE-IDEOLOGIO

La reganta ideologio de Nord-Koreio. Ĝi fundamentas ĉiujn aspektojn de la ŝtato inkluzive de politiko, ekonomio, socio kaj kulturo. La ideologio transformiĝis en instrumenton por plifortigi la unupersonan diktaturon kaj difinas la rilaton inter la reganto kaj la popolo kiel tiun inter mastro kaj servantoj.

POLITIKO PRIORITATIGANTA LA ARMEON (SON-GUN)

Temas pri politiko de Nord-Koreio, kiu celas meti la Korean Popolan Armeon **KPA** super la Korean Laboristan Partion **KLP**, kun la celo daŭre teni la diktaturon en Nord-Koreio. La influo de KPA vaste reflektiĝas en la tuta socio. Ĝia influo penetras ne nur politikon kaj ekonomion, sed ankaŭ edukadon, kulturon kaj arton.

KIMILSUNGISMO-KIMJONGUNISMO

Ideologio, kiu emfazas lojalecon al la Kim-dinastio. La konstitucio de Nord-Koreio difinas, ke Kimilsungismo-Kimjongunismo estas la sola gvida principo de la ŝtato.

SUPERA GVIDANTO (SU-RYEONG)

Nord-korea termino referencanta al la "gvidanto de la homaro". En Nord-Koreio la titolo de "supera gvidanto" povas esti uzata nur por tiuj, kiuj estas rekte ligitaj al la dinastio de Kim Il-sung, Kim Jong-il kaj Kim Jong-un. La supera gvidanto estas rigardata kiel absoluta patro kaj dio-simila estaĵo necesiganta senkondiĉan obeadon.

LA TAGO DE LA SUNO

(TAEYANG-JOL)

La Tago de la Suno estas nacia festotago de Nord-Koreio, kiu festas la naskiĝtagon de Kim Il-sung. Ĝi estas la plej grava festotago de la jaro kaj uzata por idoligi Kim Il-sung kaj pravigi heredadon de la reĝimo fare de la Kim-dinastio.

REAKCIO

(BANDONG)

Temas pri ajna ago aŭ persono, kiu defias la superan gvidanton aŭ la Korean Laboristan Partion. En decembro 2020 Nord-Koreio aprobis la "leĝon por rifuzo de reakcia ideologio kaj kulturo" por subpremi disvastigon de eksteraj informoj kaj kulturo, kiuj riskas minaci la reĝimon de Kim Jong-un.

RELIGIO


En Nord-Koreio ekzistas kristanaj, budhismaj kaj aliaj religiaj instalaĵoj, sed nur laŭnome. Fakte religiaj aktivecoj estas malpermesataj kaj ekzistantaj religiaj grupoj, preĝejoj, katedraloj kaj temploj mastrumataj de la ŝtato estas instrumento por ekstera propagando.

JUSTICA SISTEMO

La justica sistemo de Nord-Koreio funkcias kiel du-nivela sistemo, kaj akuzitoj riskas ekzekuton surbaze de nur unufoja verdikto. Estas malfacile atendi justajn kaj senpartiajn jurajn decidojn, tial ke ĉiuj justicaj organoj estas sub la rego de la Korea Laborista Partio. Advokatoj laboras nur tiom, kiom iliaj agoj pravigas politikojn kaj decidojn de la partio.

KASTA SISTEMO SURBAZE DE LOJALECO

Nord-Koreio klasifikas siajn loĝantojn en jenajn tri grupojn: la "baza" amaso, "kompleksa" amaso kaj "restaĵo de la malamikaj" soci-tavoloj. Loĝloko, laboro, porciumado, edukado, kaj eĉ puno estas malegale decidataj surbaze de kaj persona deveno **koree: chulsin-songbun** kaj grado de lojaleco.



LABORTREJNADO

Labortrejnado estas speco de puno, per kiu krimuloj estas devigataj labori ĉe difinita loko. La labortrejnado povas esti devigata sen jura proceso, kaj daŭras de ses monatoj ĝis unu jaro.

KOREKTA LABORO

Korekta laboro estas speco de puno, kiu devigas krimulojn fari pezan laboron kun la celo transformi ilin en homojn konformajn al la socialista socio. Tiuj, kiuj estas kondamnitaj al korekta laboro, estas senigataj je voĉdonrajto. Korekta laboro gamas de korekta laboro kun tempolimo **maksimume 15 jaroj** kaj sentemplima korekta laboro.

NORD-KOREA PROGRAMO POR EVOLUIGI NUKLEAJN MISILOJN

La nuklea krizo de Nord-Koreio komenciĝis en 1993 pro la anonco de la lando ekŝiĝi de la Traktato pri Nuklea Ne-Disvastiĝo. La problemo ŝajnis kvietiĝi en 1994, kiam Usono kaj Nord-Koreio subskribis "la Kadro-interkonsenton inter la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko kaj la Demokratia Popola Respubliko Koreio" en Ĝenevo. La afero tamen leviĝis denove pro la nuligo de la Kadro-interkonsento, kiam Nord-Koreio ĉesigis la frostigon **laborhalton** de retraktejoj de plutonio meze de suspekto, ke la lando pliriĉigas uranion.



FONTO DE LA FOTO

"Korea Centra Novaj-agentejo", 2022. 7. 17

Por trovi diplomatan solvon de la problemo, komenciĝis la Ses-partiaj Interparoloj inter la du Koreioj, Usono, Ĉinio, Japanio kaj Rusio. De tio rezultis kelkaj interkonsentoj inkluzive de la Komuna Deklaro de la 19-a de septembro 2005, Interkonsentoj de la 13-a de februaro kaj de la 3-a de oktobro 2005. Malgraŭ tio la interparoloj okazis lastfoje en decembro 2005, post kiam Nord-Koreio komencis rifuzi efektivigon de la faritaj interkonsentoj. Dum la tuta periodo de tiuj interparoloj Nord-Koreio publike deklaris sian celon konstrui "fortan kaj prosperan landon" per nuklea armado, kaj faris sian unuan nuklean eksperimenton en 2006. En 2009, kiam la Interparoloj daŭre estis interrompitaj, la lando faris sian duan nuklean eksperimenton.

Nord-Koreio akriĝis tension **streĉojn** sur la korea duoninsulo denove en 2010, atakante la sudkorean batalŝipon Cheonan en marto kaj kanonante la insulon Yeonpyeong en novembro. En 2012 per duflanka traktado Usono kaj Nord-Koreio atingis la "Interkonsenton de la 29-a de Februaro", en kiu la dua promesis ĉesigi la nuklean evoluigon kaj lanĉadon de misiloj. La interkonsento tamen malvalidiĝis en la 13-a de aprilo, ĉar tiam Nord-Koreio lanĉis longdistancajn misilojn kaj eksplicite proklamis sian statuson kiel nuklea potenco en la preamblo de la konstitucio.

Sekve Nord-Koreio efektivigis nukleajn eksperimentojn en februaro 2013, januaro kaj septembro 2016, kaj septembro 2017. Aldone, por oficialigi sian statuson kiel nuklean potencon malgraŭ forta kontraŭstaro de la internacia komunumo, Nord-Koreio uzis aron da rimedoj: "deklaro de la pozicio kiel permanenta potenco kun nukleaj armiloj" en marto 2013, alprenado de "paralela politiko por evoluigo de ekonomio kaj nukleaj armiloj" en aprilo samjare, alprenado de la duparta politiko en la Partian Ĉarton de la Korea Laborista Partio en 2016, kaj enkodeksigo de "politiko de la nukleaj fortoj de la lando" en septembro 2022.

Kvankam okazis tri pintokonferencoj inter la du Koreioj en 2018 kaj la nord-korea-usona pintokonferenco en Singapuro, sennukleigo dum longa tempo eniris sakstraton post la fiaskinta nord-korea-usona pintokonferenco en Hanojo en 2019. De tiam Nord-Koreio daŭre sin okupis pri provokado. En januaro 2021 Kim Jong-un deklaris "lukton por plialtigi nuklean kapablon", emfazante finpretigon de "malgrandigitaj, malpezigitaj kaj normigitaj nukleaj armiloj, produktadon de"pli

fortaj nukleaj ŝargokapoj" kaj evoluigon de "altnivelaj teknologiaj taktikaj nukleaj armiloj. Ĉio ĉi por plialtigi la kapablon je anticipaj kaj venĝaj atakoj. Precipe en 2022 Nord-Koreio senprecedence pliakrigis la streĉitecon, lanĉante entute 71 balistikajn misilojn inkluzive de 8 interkontinentaj.

HOMAJ RAJTOJ LAŬ NORD-KOREIO

Dum homaj rajtoj estas vaste konsiderataj kiel universala valoro, la koncepto havas tute malsaman signifon en Nord-Koreio. En la lando homaj rajtoj estas aplikataj nur al tiuj, kiuj sekvas la reĝimon kaj obeas ĝin. La nord-korea reĝimo asertas, ke ne necesas garantii homajn rajtojn al tiuj, kiuj estas konsiderataj kiel minacoj al la reĝimo, ekzemple naci-perfiduloj kaj kontraŭ-revoluciuloj. Aldone Nord-Koreio argumentas, ke la normoj pri homaj rajtoj kaj ilia protektado varias de lando al lando pro malsamaj tradicioj, etnecoj, kulturoj kaj historioj. La lando antaŭenigas "homajn rajtojn de nord-korea stilo." Nord-Koreio asertas, ke la problemoj de homaj rajtoj ne povas ekzisti en lando sub "socialismo de nord-korea stilo" ĉar tiu ĉi estas unu harmonia rondo familia sub "Kim Il-sung, Kim Jong-il, kaj Kim Jong-un disdonantaj benojn al la loĝantoj."

Nord-Koreio emfazas la "principon de kolektivismo, laŭ kiu la intereso de la kolektivo ricevas prioritaton super tiuj de individuoj, kaj asertas, ke la intereso de individuo povas esti limigitaj je ajna grado por la bono de la kolektivo. Artikolo 63 de la Socialisma Konstitucio de Nord-Koreio difinas, ke "la rajtoj kaj devoj de la civitanoj de la Demokratia Popola Respubliko Koreio baziĝas sur la principo de kolektivismo de 'unu por ĉiuj, ĉiuj por unu.'" Tial en Nord-Koreio, individuoj ekzistas kiel membroj de la socio kaj de la kolektivo, kaj sindediĉo de individuo al la socio kaj la kolektivo estas rigardata kiel granda valoro.

Nord-Koreio asertas, ke homaj rajtoj estas rajtoj de la ŝtato, kaj kunligas ilin al nacia suvereneco. Laŭ la "Raporto de la DPRK-Asocio por Studoj pri Homaj Rajtoj", Nord-Koreio asertas, ke "homaj rajtoj estas internaj aferoj kaj ili premisas garantion de la ŝtata suvereneco. La temo ne estu uzata kiel celo de interveno aŭ

instrumento por pravigi ion tian. El tia perspektivo la Demokratia Popola Respubliko Koreio opinias, ke homaj rajtoj estas nenio alia ol ŝtata suvereneco - alivorte la rajto de la nacio esti sendependa."

Tiamaniere Nord-Koreio pledas por aparta kaj kolektivisma koncepto de homaj rajtoj, kiuj diferencas de la universala kompreno de homaj rajtoj. Pro tio sub Kim Jong-un persistas sistema kaj disvastiĝanta atenco al homaj rajtoj fare de la nord-korea reĝimo. La reĝimo daŭre deturnas amason da rimedoj al nuklea evoluigo eĉ se la loĝantoj frontas grandegan minacon al sia baza vivtenado. Dum la pandemio de Kovim-19 Nord-Koreio fermis siajn landlimojn pretekstante preventon de la pandemio, sed fakte interrompante fizikajn kaj homajn interŝanĝojn kun la ekstera mondo. La aŭtoritatoj plie interrompis la akiron de vivrimedoj de la loĝantoj limigante moviĝon kaj fermante bazarojn **koree: Jangmadang**. Ankoraŭ pli, kiel pruvite per la ekzemploj de publikaj ekzekutoj kaj politikaj malliberejoj, la nord-korea reĝimo subpremas la liberecon de la nord-koreoj kaj atencas iliajn homajn rajtojn por plu teni la diktatoran sistemon. La lando strikte regas kaj kontrolas nord-koreojn por malhelpi ilin aliri al eksteraj informoj, fundamente blokante ilin de uzado de iliaj rajtoj. Tial por plibonigi la protektadon de homaj rajtoj de individuoj en Nord-Koreio nepras interveno fare de la internacia komunumo.



FONTO DE LA FOTO
"Korea Centra Novaĵ-agentejo"
2023. 6. 5

Voĉoj de la Senvoĉuloj

Senvualigi la realon de homaj rajtoj
en Nord-Koreio

02

ATENCOJ AL
HOMAJ RAJTOJ
SUB LA
REĜIMO DE
KIM JONG-UN



Voĉoj
de la
Senvoĉuloj

2 Atencoj al **homaj rajtoj** sub la reĝimo de Kim Jong-un

ATENCOJ AL HOMAJ RAJTOJ DE NORD-KOREOJ

01

Subprema regado de informoj

...la aŭtoritatoj kontrolas poŝtelefonojn de junuloj kaj
priserĉas loĝejojn por vidi, ĉu ili spektas fotojn,
videojn kaj dokumentojn de eksterlandaj amaskomunikiloj
kaj uzas sud-koreajn lingvaĵojn.

Raporto de la speciala raportanto pri la situacio de homaj rajtoj en la
Demokratia Popola Respubliko Koreio, marto 2023

Regado de informoj por plutenado de la diktatora potenco

Nord-Koreio plutenas sian diktatoran reĝimon per heredado de la potenco. Dum plimulto de la socialismaj landoj kolapsis okaze de la disfalo de la ordo de la malvarma milito, Nord-Koreio sukcesas pluteni sin per strikta regado de ideologio kaj informoj, kaj per interrompo de ligoj kun la ekstera mondo. Rezulte la lando konsideras regadon de ideologio kaj informoj kiel elementon kun kerna graveco por la daŭra ekzistado de la reĝimo. Tamen tia regado estas atenco al fundamentaj rajtoj de la nord-koreoj, inkluzive de libereco je penso, libereco je konscienco, religia libereco, libereco je esprimado, libereco de gazetaro kaj eldonado, kaj rajto je aliro al informoj.

Kun la evoluo de scienco kaj inform-teknologio, por nord-koreoj fariĝis pli facile aliri al eksteraj informoj. Responde al tio, post kiam Kim Jong-un transprenis la potencon, la nordkoreaj aŭtoritatoj ankoraŭ plifortigis la regadon de eksteraj informoj, tiel ke pli malboniĝis la atencoj al la rajtoj de la loĝantoj je aliro al informoj. Plie Nord-Koreio promulgis tri ĉefajn leĝojn subpremajn por bari la fluon de informoj: la "Leĝo pri rifuzo de reakciaj ideologio kaj kulturo" ²⁰²⁰, la "Leĝo pri sekureco de junulara kulturo" ²⁰²¹ kaj la "Leĝo pri protekto de Pyongyang-a kultura lingvo" ²⁰²³. Surbaze de tiuj leĝoj nord-koreoj riskas esti ekzekutitaj simple pro privata spektado/legado de sud-koreaj filmoj, libroj aŭ videoj, pro ilia cirkuligo en Nord-Koreio aŭ eĉ pro uzo de sud-koreaj lingvaĵoj kaj tiparoj. La nord-koreaj aŭtoritatoj praktikas atencojn al la homaj rajtoj de spektantoj de sud-koreaj programeroj, kaj ili estas punataj per publikaj ekzekutoj, torturado kaj malliberigo en korektaj punestabloj kaj politikaj malliberejoj.



PHOTOGRAPH SOURCE

"Leĝo pri rifuzo de reakciaj ideologio kaj kulturo", 2023. 3. 21.

<<http://www.youtube.com/watch?v=Q80pMWkQMby>>

“En novembro 2021 gimnazianoj en la urbo Cheongjin, provinco Norda Hamgyong, sekrete spektis la mondfaman serion “Sepio-ludo” kaj estis punitaj per la “Leĝo pri rifuzo de reakciaj ideologio kaj kulturo”. La unua distribuinto estis paf-ekzekutita, kaj la studentoj, kiuj aĉetis poŝmemorilon, estis senditaj al korekta laboro sen limigita periodo. Tiuj studentoj, kiuj spektis la serion, estis kondamnitaj al kvin jaroj da korekta laboro ”

November 23, 2021, RFA

Enhavo el eksterlando estas kontraŭsocialisma kaj korupta kulturo

La nord-koreaj aŭtoritatoj forte kontrolas la enflon de eksterlandaj videoj kaj la informoj, kiujn ili enhavas. Nord-Koreio difinas eksterlandan enhavon kiel "kontraŭsocialisman kaj koruptan" kaj responde ade plifortigas cenzuron, gvatadon kaj punadon. Tiucele Nord-Koreio starigis specialigitan organizaĵon nomatan "Konstanta Unuigita Komand-taĉmento 109" por kontroli kontakton de nord-koreoj kun eksterlandaj informoj. La taĉmento direktas tiajn operacojn kiaj priserĉado de loĝejoj sen anticipa anonco aŭ mandato.

Estas raportite, ke ĝuado de ĉinaj kantoj kaj registraĵoj povas konduki al puno de labortrejnado, dum tiu de sud-koreaj televidaj dramoj al pli severaj punoj kiel korekta laboro.

Puno pro spektado de produkto el sud-korea amaskomunikilo estas pli severa ol puno pro uzo de narkotaĵo, kaj estis okazoj, en kiuj homoj rezulte de tia spektado estis senditaj al politika malliberejo. Ne mankas atestoj, ke aperis avizoj anoncantaj, ke spektado kaj cirkuligo de registraĵoj el sud-korea amaskomunikilo estas punata per morto, aŭ ke homoj trovitaj en tia ago estos paf-ekzekutitaj. Malgraŭ klopodoj de la nord-koreaj aŭtoritatoj plifortigi regadon kaj pliseverigi punojn pro posedo de eksterlandaj informoj, daŭre disvastiĝas sekreta spektado de sud-korea amaskomunikilo inter nord-koreoj.

Vastskala cenzuro de komunikado

Poŝtelefonoj uzataj de nord-koreoj estas signifa rimedo por aliri kaj disvastigi eksterlandajn informojn. La nombro de homoj, kiuj uzas sendratan komunikadon en Nord-Koreio estas taksata je ĉ. 4.5 milionoj, t.e. preskaŭ 20 procentoj de la tuta loĝantaro. Pro tio, ke poŝtelefonoj kaj komputiloj estas pli kaj pli uzataj, la nord-koreaj aŭtoritatoj alprenas diversajn metodojn por regi disvastiĝon de eksterlandaj informoj enlande. Tiuj metodoj inkluzivas muntadon de programoj por subaŭskultado kaj kontrolado, kaj instaladon de aparatoj por ĵamado kaj interkaptado. Plie la aŭtoritatoj plialtigas la kapablon de tiuj programoj per altgradigo, maskante tion kiel regulan ĝisdatigon de poŝtelefono aŭ komputilo.

Alia problemo rilate al la enfluo kaj cirkuligo de eksterlandaj informoj per video kaj poŝtelefono estas, ke la severecco de puno dependas, ĉu involviĝas subaĉetado aŭ ne. Se vi estas arestita posedante registraĵon el eksterlanda amaskomunikilo, via kapablo subaĉeti la aŭtoritatojn surloke ofte decidas, kian punon vi ricevas. Estas realaĵo de Nord-Koreio, ke mono povas solvi tian problemon tiel, ke tiuj, kiuj pretas pagi por subaĉetado povas ofte modifi la verdikton mallongigante la punon en korektolaborejo ĝis monatoj aŭ semajnoj anstataŭ jaroj.

02

Subpremo de libereco je penso kaj konscienco

La registaro de Demokratia Popol-Respubliko Koreio laŭraporte daŭrigas ekzekuti, torturi, aresti, kaj fizike atenci individuojn pro iliaj religiaj aktivecoj.

Usona Departemento de Ŝtato, majo 2023

Kim-dinastio kiel sola ideologio

Artikolo 3 de la Socialisma Konstitucio de DPRK difinas, ke Kimilsungismo-Kimjongilismo servas kiel la sola gvida principo de la ŝtato, emfazante, ke ĝi estas la sola ideologio en Nord-Koreio. Estas postulate de nord-koreoj esti lojalaj al Kimilsungismo-Kimjongilismo kiel absoluta kondutnormo, kaj estas permesata neniuj aliaj ideologioj aŭ libereco je penso aŭ je konscienco. La nord-koreaj aŭtoritatoj enplantas spionojn en la Popolajn Unuojn de Najbaraĵo **koree: Inminban** kaj aliajn organizaĵojn por sekrete kontroli la aktivecojn de la loĝantoj kaj kuraĝigi reciproke kontroladon. La aŭtoritatoj utiligas Kimilsungismo-Kimjongilismon por stigmatizi kaj puni tiujn, kiuj kaŝe havas politikajn antipatiojn kontraŭ la reĝimo, konsiderante ilin politikaj, ideologiaj krimuloj.

“Naŭ-jara elementlernejo pro la krimo grafitii per krajono sur la vizaĝoj de Kim Il-sung kaj Kim Jong-il en lernolibro, kaj maljunulino pro la krimo uzi ĵurnalpaperon kun Kim Il-sung kaj Kim Jong-il sur ĝi kiel loĝejan murpaperon kaŭzis, ke malaperis iliaj tutaj familioj.”

“Blanka Libro pri Homaj Rajtoj en Nord-Koreio 2022”, KINU, p.176

La kerna faktoro malantaŭ la manko de libereco je penso kaj konscienco en Nord-Koreio estas la personkulto, kiu originas de la regad-sistemo de la unusola Suryeong **Supera Gvidanto** en Nord-Koreio. En la lando la gvidanto superregas en ĉiuj

aspektoj de la socio, kaj ĉiu ideologio alia ol Kimilsungismo-Kimjongilismo estas kontraŭreĝima ideologio, minacanta la regad-sistemon de la unusola Su-ryeong. Pro tio, kiel klarigas rifuĝintoj el Nord-Koreio, nord-koreoj eĉ ne povas imagi iun penson alian ol Kimilsungismo-Kimjongilismon. Iu rifuĝinto el la lando diris, ke "en lernejo ili ĉiam emfazas, ke estos severa puno por malobeco al Kimilsungismo-Kimjongilismo. Ricevinte tian edukadon, oni estas cerbolavita kaj evitas ajnan agadon kontraŭ la doktrino."

Religio, la opio de la popolo

Kvankam Nord-Koreio asertas, ke en la lando religia libereco estas garantiata, ĝi fakte subpremas religiojn, kiel montras la Socialisma Konstitucio, kiu preskribas, ke "religio ne estu uzata por inviti eksterlandan intervenon aŭ damaĝi la ŝtaton kaj la socian ordon". Laŭ raporto de la DPRK-Asocio por Studoj pri Homaj Rajtoj "religia libereco estas allasata kaj donita de la ŝtata leĝo ene de la limo necesa por certigi socian ordon, sanon, socian sekurecon, moralon kaj aliajn homajn rajtojn." La raporto emfazas, ke religio principe estas metata sub la regadon de la ŝtato.

Ekde la starigo de la reĝimo Nord-Koreio limigadas religiajn aktivecojn de nord-koreoj surbaze de la instrukcio de Kim Il-sung, laŭ kiu "religio estas la opio de la popolo."

Oficistoj de la Korea Laborista Partio vizitis la Kumsusan-Palacon de la Suno en Pyongyang ĉirkaŭ la naskiĝtago de Kim Il-sung (Tago de la Suno) por omaĝi la gvidanton.

FONTO DE LA FOTO

"Korea Centra Novaj-agentejo" 2023. 2. 17



Plie multaj kristanoj estas subpremataj en Nord-Koreio laŭ la ideo, ke ili prezentas negativan influon al la stabileco de la reĝimo. La lando endoktrinigas al nord-koreoj la ideojn, ke "religio estas ideologio falsa kaj trompa" kaj misiistoj estas "homoj malbonaj". Rezulte nord-koreoj evitas montri interesiĝon pri religio, kaj la vorto "misiisto" elvokas ĉe ili timon.

Noto 2. En 2021 Kim Jong-un plifirmigis la ideon, ke religio estas puninda afero, per la "Leĝo pri sekureco de la junulara kulturo", kiu eksplicite malpermesas "religion kaj superstiĉajn agojn".

“En 2015 du virinoj estis ekzekutitaj en Provinco Norda Hwanghae pro disvastigo de kristanismo al aliaj homoj, kaj en 2018 du homoj estis publike ekzekutitaj en Pyongsong, Provinco Suda Pyongan, pro malkovrita posedo de Biblio. En 2019 malkovriĝis subtera preĝejo, kaj rezulte 5 personoj estis publike ekzekutitaj, 7 personoj senditaj al politikaj malliberejoj, 30 kondamnitaj al korekta laboro, kaj 50 deportitaj de Pyongyang al aliaj regionoj.”

"Blanka libro pri homaj rajtoj en Norda Koreio 2022", KINU, p.185

Kenneth Bae, koreo-usonano, venis al Nord-Koreio en la 3-a de novembro 2012, kaj sekve estis detenita pro la posedo de Biblio. En aprilo 2013 li estis kondamnita al 15 jaroj de peza laboro pro "malamikaj agoj kontraŭ la Respubliko." Li estis liberigita en la 8-a de novembro 2014 kaj revenis al Usono.

FONTO DE LA FOTO

"Korea Centra Novaĵ-agentejo", 2014. 1. 20



03

Kronika manko de manĝaĵoj

“

Kondamnante la Demokratian Popol-Respublikon
Koreio pro naciaj politikoj,
kiuj pli kaj pli deturnas ĝiajn rimedojn al strebado pri akiro
de nukleaj armiloj kaj balistikaj misiloj prefere
ol la bonfarto de la popolo kaj ilia aliro al manĝaĵoj...

Rezolucio aprobita de la Konsilio pri Homaj Rajtoj de UN en aprilo 2023

”

La plej grava manko de manĝaĵoj ekde la “Marŝo de Sufero”

La internacia komunumo daŭre dissendas avertojn pri la tikla situacio de manĝaĵoj en Nord-Koreio. De 2016 al 2022 la averaĝa jara produktado de greno en Nord-Koreio estis taksata je ĉ. 4.6 milionoj da tunoj, kiu devas rezulti en jara manko de proksimume miliono da tunoj da manĝaĵoj. Tio signifas, ke la tuta loĝantaro de Nord-Koreio spertas ĉiujare de du ĝis tri monatoj da manko de manĝaĵoj. Plie inter 2019 kaj 2021 en la lando estas subnutrataj laŭtakse 10.7 milionoj da homoj, kio egalas al 41.6 procentoj de la tuta loĝantaro.

Tiu ĉi nombro superas tiun de la homoj subnutrataj en la unuaj jaroj de la 2000-aj jaroj sekve de la malsato en Nord-Koreio, konata ankaŭ kiel la “Marŝo de Sufero.”

FONTO DE LA FOTO Kang Dong-wan, profesoro de Universitato Dong-a



Kompleta fermo de la landlimo dum la pandemio

Post la ekplodo de la pandemio de Kovim-19 Nord-Koreio komplete fermis siajn landlimojn kaj forpelis la personaron de ĉiuj internaciaj organizaĵoj lokitaj en Nord-Koreio, tiel efike interrompante ĉiujn homajn kaj materiajn interŝanĝojn kun la ekstera mondo. Ĉar Nord-Koreio dependis de internaciaj subtenoj por ŝtopi la jaran mankon de manĝaĵoj, la situacio de la lando pri manĝaĵoj signife malboniĝis pro la fermo de ĝiaj landlimoj. Plie pro la rapida disvastiĝo de Kovim-19 Nord-Koreio metis limigon de moviĝoj en majo 2020, kaj el tio rezultis signifa reduktiĝo de manĝaĵ-komerco kaj plimultiĝo de raportoj pri kresko de malsato en iuj regionoj. La nord-korea reĝimo tamen daŭre rifuzis internaciajn helpojn dirante, ke tio estas provo de imperiistoj por subjugigi kaj superregi Nord-Koreion.

“Lastatempaj raportoj montras, ke kreskas la nombro de mortoj pro subnutrado, kun dekoj da homoj mortantaj ĉiutage en Kaesong. La situacion plimalbonigis ekstrema malvarmo, kaj sekvis raportoj pri sinmortoj pro malriĉeco. Kaesong estas konsiderata kiel “speciala urbo” aŭ “modela urbo” en Nord-Koreio tiel, ke raportoj pri mortoj pro subnutrado en la urbo sugestas pli severajn manĝaĵ-mankojn en duarangaj urboj.”

6-an de februaro, 2023, Novaĵ-agentejo Yonhap

Kolapso de la publika porciuma sistemo

La oficiala sistemo de manĝaĵ-distribuado de Nord-Koreio, la Publika Porciuma Sistemo, ne funkcias konvene. Diskriminacia kaj malregula manĝaĵ-distribuado malsukcesas trakti mankon de manĝaĵoj de la nord-koreoj. La porcioj donataj de la ŝtato unuavice iras al tiuj, kiuj laboras en registaraj institucioj, kaj la ĝenerala loĝantaro sukcesas ricevi entute aŭ nenion aŭ nur minimumon. Do nord-koreoj provas provizi sin per manĝaĵoj kreante hejman ĝardenon aŭ kultivante legomojn sur monto proksime de siaj loĝejoj. Ekde 2015 tamen la nord-koreaj aŭtoritatoj limigis tiajn agojn pretekste de senarbigoj kaj damaĝoj pro inundo, kaj el tio rezultis plia severiĝo de manĝaĵ-manko de la loĝantaro.

04

Atencoj al homaj rajtoj de virinoj kaj infanoj

Nord-Koreio havas laŭtakse la plej grandan gradon de moderna sklaveco en la mondo: po 104.6 por 1000 personoj.

Moderna sklaveco estiĝas, kiam viktimoj ne povas eviti ekspluatadon pro minaco, perforto, trudo aŭ trompo.

2023 indekso de tutmonda sklaveco, majo 2023

La plej bela socio, kiu respektas virinojn?

Laŭ la laŭlanda raporto kadre de la Universala Perioda Revizio UPR de la **Konsilio pri Homaj Rajtoj de UN** pri Nord-Koreio por 2019 kaj la raporto 2021 por la Volonta Nacia Revizio VNR de **Agendo 2030 por Daŭripova Evoluigo**, Nord-Koreio asertas, ke la lando garantias rajtojn de virinoj celante genran egalecon. Superregas tamen la profunde enradikiĝintaj nocioj de vir-regado, fiksitaj genraj roloj kaj kulturo de genra diskriminacio.

Per la "Leĝo pri protektado de la rajtoj de virinoj" Nord-Koreio malpermesas ĉiujn formojn de hejma perforto kaj preskribas administran aŭ kriminalan respondecon al atencintoj. La nord-koreaj aŭtoritatoj tamen perceptas hejman perforton nur kiel aferon de familio, kaj estas minimuma interveno fare de la polico por trakti okazojn de hejma perforto. Kiel kaŭzoj de hejma perforto en Nord-Koreio estas



FONTO DE LA FOTO Kang Dong-wan, profesoro de Universitato Dong-a

menciataj ekonomia malriĉeco, adulto, alkoholismo kaj misuzo de narkotaĵo. Tamen hejma perforto malofte kaŭzas punon tial, ke ĝiaj viktimoj praktike ne estas protektataj de la ŝtato aŭ de la socio. Aldone mankas konscio pri seksa perforto inter la nord-koreoj tiom, ke multaj virinoj ne konscias pri seksa perforto, krom se ĝin akompanas fizika perforto. Laŭ atestoj de rifuĝintoj seksaj atencoj estas raportataj en Nord-Koreio simple kiel perfortaĵoj, ĉar viktimoj de seksaj atencoj frontas socian stigmatizon, kaj seksaj atencoj fare de konatoj ne estas konsiderataj kiel seksaj atencoj.

“Estas taksate, ke perfortaĵoj, kiujn viroj iniciatas kontraŭ virinoj, okazas en 70 ĝis 80 procentoj de la nord-koreaj mastrumoj. Ekzistas tamen neniu jura rimedo, kaj do virinoj estas elmetataj al ĉiutagaj mistraktoj.”

“Blanka libro pri homaj rajtoj en Nord-Koreio 2022”, KINU, p.368

“Mi spertadis nombron da seksaj molestadoj survoje hejmen nokte, sed mi neniam vidis iun punita pro tio. Seksaj molestadoj kaj atencoj estas ĉie en Nord-Koreio.”

“Blanka libro pri homaj rajtoj en Nord-Koreio 2022”, KINU, p.372

La Korea Unio de Infanoj estas organizaĵo kreita por la ideologia edukado de infanoj kaj adoleskantoj.

La nord-koreaj aŭtoritatoj mobilizas ilin por partopreni en eventoj kiel ceremonioj, kie ili donace ricevas replikojn de multobla raketlanĉilo Sonyon [Knabo].

FONTO DE LA FOTO

“Korea Centra Novaj-agentejo”
2023. 6. 7



Senkompara paradizo por infanoj?


Infanoj, se konsideri ilian fizikan kaj mensan malmaturecon, necesigas apartan protekton kaj prizorgon inkluzive de juraj protektadoj. Nord-Koreio ratifis la Internacian Konvencion pri Infanaj Rajtoj en 1990, unu jaron post ĝia adopto fare de UN. En sia raporto por 2017 submetita al la Komitato de UN pri la Rajtoj de la Infano, Nord-Koreio memtaksis, ke "la nord-koreaj infanoj plene ĝuas siajn rajtojn en akordo kun la politiko de la Supera Gvidanto Kim Jong-un kun amo por infanoj, kaj ilia bonfarto estas plie antaŭenigata ĝis alta grado.

Sed fakte la infanoj en Nord-Koreio ricevas ekscesan politikan kaj ideologian edukadon, kaj ofte estas mobilizataj por propagandaj aranĝoj de la reĝimo, tiel ke ili ne havas sufiĉe da tempo por ripozo kaj distriĝo. La rajtoj de la lernantoj je edukado estas damaĝataj tial, ke ili estas mobilizataj por paradoj en naciaj festotagoj, korusoj **koree: gachangdae** dum elektadoj, kaj artoprezentado en ceremonioj de la mortodatreveno de Kim Jong-il. Aldone la lernantoj devas partopreni en grupa gimnastiko por festi la ĉiujaran Tagon de la Suno - la 15-an de aprilo -, kiu festas la naskiĝon de Kim Il-sung. Ili estas devigataj elteni gimnastikon eĉ ĝisnokte en la malvarma vetero de februaro. Iuj lernantoj kolapsis dum gimnastiko en la arda somera varmego.

La lernantoj estas devigataj ricevi militan trejnadon kaj ofte mobilizataj al diversaj formoj de laboro dum ripozoj aŭ lecionoj, tute senrilate al sia oficiala studprogramo.

FONTO DE LA FOTO

Kang Dong-wan, profesoro de Universitato Dong-a



Laŭ atestoj la lernantoj dum la trejnado lernas paf-ekzercon, muntadon kaj malmuntadon de pafilo, soldatan rampadon, gardostaradon, kaj armean disciplinon,

kaj en la lasta tago eĉ veran pafadon. Ili estas mobilizitaj ankaŭ por elradikigo de fiherboj kaj plantado de rizo printempe kaj rikoltado de terpomoj aŭtune. Tiuj devigaj mobilizadoj en kamparo komenciĝas frue en la mateno, donante al la lernantoj grandan fizikan ŝarĝon kaj psikan premon. Plie la lernantoj estas ofte mobilizitaj ĉe konstruejoj por plenumi tiajn taskojn kiaj sablo- kaj gruzo-transportado kaj por arbohakado aŭ konstruado de fervojo.

Kvankam Nord-Koreio pretendas, ke la lando malpermesas laboron de infanoj per leĝo kaj jam elradikigis ĝin ĉiuforme, fakto estas, ke infanoj estas submetataj al fizikaj kaj mensaj suferoj pro labormobilizado en diversaj farmbienoĵ kaj konstruejoj.

“En la 9-a de majo 2023 la nord-koreaj aŭtoritatoj sendis pli ol 70 lerneĵanojn de la mezlernejo Pyongsong, edukejo por orfoj en la aĝoj de 12 ĝis 15 jaroj, al la Grandrapida Sturmtaĉmento Suda Pyonggan, por ke ili partoprenu en konstrua laboro en la distrikto Seopo de Pyongyang.”

La 9-an de majo 2023, interreta ĵurnalo Daily NK



05

Regado de moviĝo kaj devigata deportado

“

Limgardistoj estas ordonitaj “senkondiĉe pafi” vidante iun,
kiu sen permeso venas aŭ foriras.
Estas pluraj raportoj pri limgardistoj pafantaj nord-koreojn,
kiuj provas forlasi la landon,
kaj rezultis kelkaj mortoj.

Tutmonda raporto 2023, Observejo pri homaj rajtoj, januaro 2023

”

Pliaj limigoj je moviĝo

Dum la Nord-Korea Konstitucio klare specifikas 'liberecon je loĝado kaj vojaĝo', **Artikolo 75** la aŭtoritatoj limigas al nord-koreoj liberecon de moviĝo. La nord-koreoj devas akiri vojaĝ-permeson por iri al aliaj regionoj, kaj pli striktaj regado kaj mastrumado aplikiĝas, kiam oni vojaĝas al Pyongyang aŭ al landlimaj regionoj. Nord-korea leĝo limigas liberan moviĝon kaj diras, ke tiuj, kiuj malobeas la 'ordonon pri vojaĝado' povas esti submetataj al pli ol tri monatoj da nepagata laboro aŭ reeduka labordisciplinado.

Dum vojaĝo neplenaĝuloj devas esti kune kun kuratoro, kiu posedu vojaĝ-permeson, kaj por oficvojaĝo eĉ registaraj oficistoj devas akiri tian permeson. Pacientoj devas havigi al si kuracistan diagnozon kaj ankaŭ dokumenton, kiu specifikas la lokon de la hospitalo aŭ la loĝlokon de la sanzorganto, por vojaĝi kurac-cele. Plie alveninte al sia celloko vojaĝantaj nord-koreoj devas raporti sian alvenon al la ĉefo de la loka Popola Unuo **koree: inminban** kaj devas registri sin sur la listo de vojaĝ-permesoj. Ankaŭ estas postulata stampo de la Ministerio



Vojaĝpermesilo

de Popola Sekureco MPS. Ĉar necesas minimume semajno por akiri vojaĝ-permeson, kreskas nombro de nord-koreoj, kiuj subaĉetas lokajn oficistojn por plirapidigi la proceduron. Ekde la enpotenciĝo de Kim Jong-un en 2015, raportoj indikas, ke elformiĝas merkataj prezoj pri subaĉetado por akiri vojaĝ-permeson.

“En Sinuiju, vojaĝi al Pyongyang kostas ĉirkaŭ 200 ĉinajn juanojn kaj iri al Cheongjin 100 juanojn, dum vojaĝi de Cheongjin al Sinuiju 200 juanojn. Dum la prezoj por forlasi specialajn zonojn kiel Pyongyang al ĝeneralaj zonoj estas relative malgrandaj, kostas duoble la subaĉetado por eniri specialajn zonojn el ĝeneralaj.”

“Blanka libro pri homaj rajtoj en Nord-Koreio 2022”, KINU, p.118

Aldone, post la eksplodo de Kovim-19, Nord-Koreio ekvalidigis la “Leĝon pri kriz-tempa kvaranteno” kaj efektivigis rimedojn kiel blokadon, limigon, baradon kaj izoladon, por komplete regi moviĝon de la nord-koreoj. La “Leĝo pri kriz-tempa kvaranteno” diras, ke malobeoj povas esti punataj per morto, kio kaŭzas plian zorgon, ke nord-koreoj povus fronti ekscesan punon pro malobservo de la leĝo.

For la katenojn!

La nord-koreaj aŭtoritatoj ne nur devige elpelas “ribelemajn elementojn”, kontraŭ-reĝimajn personojn kaj iliajn familiojn, sed ankaŭ devige translokas “homojn kun malbona klasa/familia fono”. “Deviga elpelo” referencas al deviga translokado de individuoj fare de la ŝtato, kaj do lezas liberecon de individuo je loĝado kaj moviĝo. Kim Jong-un translokas nedeziratajn loĝantojn kiel eksajn prizonulojn kaj senlaborulojn for de Pyongyang, dume donante pliajn privilegiojn kiel pligrandigitan manĝaĵ-porcionadon en la ĉefurbo. Eĉ pli, tiuj, kiuj faris ‘kontraŭ-socialismajn’ krimojn kiel prostituadon, kontrabandadon de narkotaĵoj kaj fraŭdon, estas devigataj al ellokiĝo kune kun siaj familioj. Estas raportataj ankaŭ devigaj translokadoj laŭlonge de la landlimo, plenumitaj kun la celo malhelpi fuĝadon. Ĉirkaŭ la jaro 2015 la nord-koreaj aŭtoritatoj devige translokis preskaŭ 200 mastrumojn kaj detruis iliajn loĝejojn en la limregiono de Samjiyon.

“Post kiam filo estis akuzita pri fraŭdo, lia patrino estis devige elpelita al alia regiono, kaj alia virino estis mortpafita post arestiĝo pro funkciigo de putinejo, kaj ŝia filo forpelita.”

“Blanka libro pri homaj rajtoj en Nord-Koreio 2022”, KINU, p.126

06

Malrespekto de la vivo

Kontrolado estas ĉie,
same kiel arbitraj aresto kaj malliberigo,
kaj kruelas puno pro politikaj krimoj


Libereco en la mondo 2023, Freedom House, marto 2023

"Ĉiu homo havas denaskan rajton je vivo. Tiu ĉi rajto devas esti protektata per leĝo. Neniu estu arbitre senigita je sia vivo. " La rajto je vivo, kiel esprimite en la artikolo 6-1 de la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj IPCPR, estas rekonata kiel la plej fundamenta rajto de ĉiu homo kaj funkcias kiel bazo por aliaj rajtoj. Kiel membro de la Pakto, Nord-Koreio havas devon protekti la rajton je vivo de la nord-koreoj. Tamen, kvankam la nord-koreaj aŭtoritatoj pretendas protekti tiu ĉi rajton per ŝtataj leĝoj kaj institucioj, tiu ĉi pretendo tute ne kongruas kun la realo.

En Nord-Koreio regule okazas arbitraj aŭ kontraŭleĝaj arestoj kaj malliberigoj. Sen taŭga proceduro estas sendataj al politikaj malliberejoj precipe tiuj, kiuj kritikas la reĝimon, insultas la superan gvidanton, provas eskapi al Sud-Koreio aŭ okupiĝas pri religiaj aktivecoj.

"En januaro 2016, en Hyesan, Provinco Ryanggang, mia filo estis arestita kaj forportita de neidentigita viro sen informo pri kialo aŭ akuzo. Li estis retenita dum kelkaj tagoj kaj pridemandita ĝis liberigo."

"Blanka libro pri homaj rajtoj en Nord-Koreio 2022, KINU, p.81



Eĉ homoj senigitaj je libereco pro krimoj faritaj havas rajton je humana traktado. Sed en Nord-Koreio homoj malliberigitaj en "reedukejoj" *kyohwaso*, "labordisciplinejoj" *rodong-danryundae* kaj aliaj prizonoj devas elteni arbitrajn atencojn kaj kruelan traktadon. La kondiĉoj nutra, higiena kaj medicina de tiuj ĉi lokoj estas tiom malbonaj, ke ofte mortas kaptitoj.

“Inter la jaroj 2018 kaj 2019, dum kiuj mi estis en malliber-centro (guryu-
jang), por manĝoj mi ricevis nur manplenon da maizo kun sala akvo, kaj ilia
kvalito estis tiom malbona, ke eĉ hundoj rifuzus ilin manĝi.”

"Blanka libro pri homaj rajtoj de Nord-Koreio 2022", KINU, p.107

Malgraŭ ke la Kriminala Leĝo kaj la Leĝo pri Kriminala Proceduro de Nord-Koreio havas klaŭzojn kontraŭ torturo kaj malhumana traktado, dum la traktado de kriminalaj aferoj okazas hororaj atencoj al homaj rajtoj kiel torturo kaj mistraktado.

“Mi estis submetita al la tiel nomata “aviadila torturo” dum esplorado fare
de la Ministerio de Ŝtata Sekureco. “Aviadila torturo” estas, ke vi unue
frontas la muron, due fleksas la talion kaj trie premas la malantaŭon de via
kapo kontraŭ la muro, kaj fine levas viajn brakojn, tiel ke viaj mandorsoj
tuŝu la muron. Ili senkomplete batas vin, se vi moviĝas eĉ iomete.”

"Raportoj pri Homaj Rajtoj en Nord-Koreio 2023"
Ministerio pri Unuiĝo de Respubliko Koreio, p.71

Por enradikigi timon en la popolon, la nord-koreaj aŭtoritatoj publike ekzekutas homojn pro politikaj konvinkoj, superstiĉo, misuzo de narkotaĵoj, murdo, spektado kaj distribuado de sud-koreaj filmoj, kaj aliaj krimoj. Plie ofte okazas ekzekutoj eksterleĝaj, simpligitaj aŭ arbitraj fare de ŝtataj funkciuloj. Eĉ neplenaĝuloj estas subigataj al mortpuno.

“Post kiam Kim Jong-un atingis la potencon, estas regule konfirmataj murdoj aŭ ekzekutoj de altranguloj kiel Kim Jong-nam kaj Jang Song-thaek.”

“Blanka libro pri homaj rajtoj en Nord-Koreio 2022, KINU, p.48

“En 2018 ĉe la riverbordo en Chongjing du personoj estis publike ekzekutitaj pro religiaj kaj superstiĉaj agoj, kaj unu el ili estis neplenaĝulo. En 2015 ses adoleskantoj en aĝoj inter 16 kaj 17 jaroj, ĉiuj diplomitaj de prestiĝa mezlernejo, estis kondamnitaj al morto, kaj ilia verdikto estis tuj plenumita fare de paf-taĉmento en la Stadiono Wonsan. Iliaj krimoj estis spektado de sud-koreaj videoj kaj uzo de narkotaĵo.”

“Raportoj pri Homaj Rajtoj en Nord-Koreio 2023”
Ministerio pri Unuiĝo de espubliko Koreio, p.381

Estas kredate,
ke Kim Jong-un estis envolvita en la
murdo de lia duonfrato Kim Jong-nam
kaj la ekzekuto de lia duononklo
Jang Song-thae.



FONTO DE LA FOTO

“Rodong Sinmun”, 2013. 12. 13

07

Politikaj malliberejoj (Kwanliso)

“

Ekscese mizeraj estas nutrado,
higieno kaj medicina situacio ene de la politikaj malliberejoj.
En tiuj malliberejoj okazas torturoj kiel batado,
ŝokoj per alttensia elektro kaj torturoj per akvo,
kaj infanoj estas devigataj labori pli ol 12 horojn,
senigite je la ŝanco ricevi edukadon.

Laŭlanda raporto de UN pri homaj rajtoj 2022: Nord-Koreio, marto 2023

”

Ĉiu imagebla atenco al homaj rajtoj

Ekde la epoko de Kim Il-sung Nord-Koreio ade utiligas politikajn malliberejojn kiel rimedon de regado por konservi sian reĝimon. Seriozaj kaj gravaj atencoj al homaj rajtoj estas plenumataj fare de la nord-koreaj aŭtoritatoj, kaj tiuj malliberejoj povas esti nomataj eksponejo de atencoj al homaj rajtoj. Pro tio la nord-koreoj havas tre fortan senton de timo pri tiuj ejoj. Laŭ datumoj publikigitaj de la Korea Instituto por Nacia Unuiĝo en 2023, de 80000 ĝis 120000 politikaj malliberuloj estas katenitaj en la malliberejoj N-ro 14 kaj 18 en Kaechon, Provinco Suda Pyongan, la malliberejo N-ro 16 en Kantono Kwaseong, Provinco Norda Hamgyong, kaj la malliberejo N-ro 25 en Cheongjin. Tamen dum la 3-a Universala Perioda Revizio en 2019 la nord-koreaj aŭtoritatoj oficiale neis la ekziston de politikaj malliberuloj kaj politikaj malliberejoj, pretendante, ke tiuj terminoj mem ne ekzistas.

Laŭ Artikolo 16-1 de IPCPR ĉiuj homoj estas egalaj antaŭ kortumoj kaj tribunaloj, kaj estas rajtigataj je justa kaj publika pridemandado fare de kompetenta, sendependa kaj senpartia tribunalo surbaze de la leĝo por decidi kriminalan akuzon kontraŭ ili. Sed Nord-Koreio ne garantias al iu ajn la rajton je justa proceso,

precipe se la akuzito estas konsiderata kiel minaco al la reĝimo. Se la reĝimo sentas sin minacata, nord-koreoj ofte estas enkarcerigataj en politikajn malliberejojn sen ajna formala proceduro. Plie Nord-Koreio aplikas la sistemon de "kulpo-per-sango-rilatoj", tiel ke ĝi ne nur punas rekte la politikajn krimulojn mem sed ankaŭ iliajn familianojn kaj parencojn.

Ekzisto mapli ol homa

luj el la plej oftaj kialoj por esti sendita al politika malliberejo estas jenaj: familia fono "chulsin-songbun", kontraŭstaro al la reĝimo, malrespekto al la supera gvidanto, spionado, religiaj aktivecoj, misuzo de potenco, fuĝo kaj aferoj rilataj al Sud-Koreio. Tiuj, kiuj kontraŭstaras la reĝimon aŭ kritikas Kim Jong-un iras tuj al politikaj malliberejoj. Estas raportite, ke homoj, kiuj havas permeson fari komercon en Ĉinio, estas senditaj al politikaj malliberejoj pro akuzoj de spionado, pro la fakto, ke ili kontaktis sud-koreojn kaj interagis kun ili, aŭ ke ili portis en Ĉinion nord-koreajn ĵurnalojn. Nord-koreoj estas sendataj al politikaj malliberejoj ankaŭ pro tio, ke ili aktivis por religio.

“Se vi tordas la parolojn de Kim Jong-un aŭ malsukcesas ĝuste plenumi liajn politikojn, oni metas vin en politikan malliberejon.”

"Blanka libro pri homaj rajtoj en Nord-Koreio 2022, KINU, p.456

Estas multaj, kiuj estas sendataj al politikaj malliberejoj pro aferoj rilataj al Sud-Koreio. Tiuj okazoj inkluzivas, ke oni akceptis monon el Sud-Koreio, oni telefonis al Sud-Koreio, oni planis fuĝi al Sud-Koreio, oni pagite makleris pri fuĝo al Sud-Koreio, ke oni kontaktis sud-koreojn, ke oni eldiris opinion favoran al Sud-Koreio, oni provizis Sud-Koreion per konfidencaj dokumentoj aŭ informoj, kaj multo pli.

En politikaj malliberejoj la enkarcerigoj estas traktataj kiel subhomoj, kaj ofte estas nomataj "laborformikoj". En tiuj malliberejoj okazas arbitraj ekzekutoj fare de la aŭtoritato de la ejo sen taŭga proceduro. La kialo povas esti malobservo de disciplino aŭ malobeo al ordono. Fizikaj mistraktoj kaj perfortoj estas ĉiutagaĵoj, la

kondiĉoj nutraj, higienaj kaj medicinaj estas pli ol granda mizero kaj multe suferigas la prizonulojn. Tie estas malrespektata eĉ la plej baza homa rajto, la rajto je familio. Rifuĝintoj atestas, ke gepatroj kaj infanoj ne povas loĝi kune, kaj eĉ geedzaj paroj estas devigataj loĝi aparte. Geedziĝo kaj nasko de bebo estas malpermesataj, kaj geedza paro estas opukata en malsamaj skipoj taga aŭ nokta, tiel ke ili havu malpli da komuna tempo.

“En aprilo 2016, prizonulo, kiu estis kaptita dum provo eskapi el la Reedukejo Hamhung estis publike ekzekutita sen ajna jura proceso.”

“Blanka libro pri homaj rajtoj en Nord-Koreio 2022, KINU, p.47



FONTO DE LA FOTO

jutuba konto "Arirang day",
reala videosceno de nord-koreaj fuĝontoj kaptitaj en la faro.
2020. 11. 15

<http://www.youtube.com/watch?v=qgVWfaXLvig>

ATENCOJ AL HOMAJ RAJTOJ DE KOREOJ EKSTERLANDE

01

Nord-koreaj eskapintoj en Ĉinio

“

La Komitato “notas kun zorgo,
ke fuĝintaj nord-koreaj virinoj kaj knabinoj estas kategorie klasifikataj kiel
“kontraŭleĝaj elmigrantoj” kaj kelkaj estas trude revenigitaj.

Ĝi plie notas kun zorgo,
ke infanoj naskitaj en Ĉinio de nord-koreinoj estas
senigitaj je siaj rajtoj al naskiĝ-registrado, nacieco, edukado kaj sanservo,
ĉar ilia naskiĝo ne povas esti registrita sen elmeti la
patrinon al la risko de deportado al Nord-Koreio

Konkludaj observoj pri la naŭa perioda raporto de Ĉinio al la
Konvencio pri forigo de ĉiu diskriminacia formo kontraŭ virinoj, majo 2023

”

Trans la Panoptiko

Ĉar manko de manĝaĵoj en Nord-Koreio intensiĝis en la mezo de la 1990-aj jaroj, kreskis la nombro de nord-koreoj, kiuj kontraŭleĝe transiris la landlimon kaj setlis en Ĉinio. Plimulto de tiaj eskapintoj estis virinoj, tial ke virinoj en Nord-Koreio estas sub pli malstrikta kontrolado ol viroj. En Nord-Koreio viroj estas sub pli strikta kontrolado pro la atendo, ke ili laboru kaj soldatservu, dum de virinoj oni atendas ĉefe al hejmajn laborojn. Unu el la problemoj, kiujn frontas nord-koreaj eskapintoj, estas homkontrabandado. Organizitaj homkontrabandistoj ĉefe celas virinojn, sed ankaŭ viroj estas negocataj kiel fonto de laborforto en kamparaj regionoj de Ĉinio. Dum plimulto de nord-koreinoj ekspapintaj al Ĉinio estas kontrabandataj per trompa aŭ truda metodo, troveblas okazoj, en kiuj virinoj propravele vendis sin, ĉar ili ne havis monon por subaĉetado.

Specife ekde kiam Kim Jong-un komencis pli rigore agi kontraŭ fuĝoj, multaj sentis sin senhelpaj kaj memvole iĝis objekto de homkontrabandado pro malespero, kredante ke tio estas la sola rimedo por forlasi Nord-Koreion.

Nord-koreinoj, tuj post kiam ili estas kontrabanditaj en Ĉinion, ofte estas truditaj en prostituadon en karaoke-drinkejo aŭ aliaj distrejoj. Ili estas ankaŭ vendataj al ĉinaj viroj kiel novedzinoj aŭ simple kiel kontentigiloj de seksaj deziroj. Nord-koreinoj, kiuj estas kontrabanditaj kaj devigitaj edziniĝi, vivas sub la suspektemaj okuloj de siaj novaj edzoj, familianoj kaj najbaroj, kaj ili estas devigataj elteni seksajn kaj fizikajn mistraktojn, alokoholismon kaj hazardludadon de siaj edzoj. Eĉ se ili provas eskapi, estas malfacile por nord-koreinoj vivteni sin en Ĉinio. Rezulte ili ofte venas al la ideo, ke edziniĝo al ĉino estas ilia sola elekto. Plie nord-koreaj rifuĝintoj en Ĉinio konstante estas elmetitaj al la minaco de deva reiro al Nord-Koreio pro sia kontraŭleĝa, fremdula statuso. Jen la fundamenta kaŭzo, kial nord-koreaj rifuĝintoj ne povas agi alimaniere ol akcepti tian brutalan situacion kiel homkontrabandadon, hejman perforton aŭ laborekspluatadon.

Perforto al revenigitaj rifuĝintoj

Rifuĝintoj trude revenigitaj el Ĉinio estas pridemandataj de la Ministerio pri Ŝtata Sekureco **angle: DSS**, kio implicas atencojn al homaj rajtoj kiel torturado kaj mistraktado. Ekde sia enpoteciĝo Kim Jong-un plisseverigis punojn por tiuj, kiuj estis trude revenigitaj al Nord-Koreio. Kontaktado kun kristanoj aŭ provo eskapi al Sud-Koreio estas konsiderata kiel grava krimo, kaj se vi estas trude revenigita al Nord-Koreio, vi estas kondamnita al korekta laboro aŭ sendata al politika malliberejo sen jura proceso. La internacia komunumo ade petegas Ĉinion haltigi devigitan revenigon de fuĝintaj nord-koreoj surbaze de la Konvencio de UN kontraŭ torturo kaj la Konvencio pri la statuso de rifuĝintoj. Ĉinio tamen asertas, ke la nord-koreaj rifuĝintoj ne estas 'rifuĝintoj' sed 'kontraŭleĝaj fremduloj' aŭ 'ekonomiaj elmigrintoj'.

Trude revenigitaj nord-koreoj travivas severajn atencojn de homaj rajtoj dum la procedoj de revenigo kaj posta pridemandado.




La plej signifaj mistraktoj inkluzivas devigitajn abortojn kaj malhumanan traktadon. Se oni trovas, ke nord-koreino estas graveda kun infano de ĉino dum la proceduro de revenigo, la nord-koreaj aŭtoritatoj uzas medikamentojn aŭ aplikas proceduron de dilatado kaj uterskrapo **angle: D&C** por abortigo. Aldone, en malliberejoj okazas seksaj perfortoj al revenigitaj koreinoj. La aŭtoritatoj ofte devigas malliberigitoj al nudan priesploro por serĉi monon, sekretajn leterojn kaj konfidencajn dokumentojn. Dum tiu proceduro kutime okazas ankaŭ malhigiena ekzameno de utero.

“En decembro 2016 rifuĝintino en la kvara monato de gravedeco estis devigita aborti en la Kolektejo Hyesan, Provinco Ryangan. Tuj post la operacio ŝi estis mobilizita al arbo-hakado kaj -transportado kaj ŝajne trovis tion tre peniga.”

“Blanka libro pri homaj rajtoj en Nord-Koreio 2022”, KINU, p.377

“En 2017 devige revenigita virino estis submetita al ekzameno de la utero, en Kantono Onsong, Provinco Norda Hamgyong, fare de virina oficisto de la Ministerio de Ŝtata Sekureco. Kiam la ekzameno montriĝis senrezulta, ŝi estis devigita ripete sidi kaj stari, kaj manĝaĵo estis donita al ŝi por instigi 'movadon de la intesto'. Tuj kiam ŝi fekis, la ekzameno estis rekomencita.”

“Blanka libro pri homaj rajtoj en Nord-Koreio 2022”, KINU, p.378



FONTO DE LA FOTO
Kang Dong-wan, profesoro de Universitato Dong-a

02

Nord-koreaj laboristoj eksterlande

“

Granda plimulto de nord-koreoj dungitaj ekster la lando estis en Rusio kaj en Ĉina Popol-Respubliko. Laboristoj laboris inter 12 kaj 16 horoj ĉiutage. Ili ricevis salajron, kiu averaĝe gamis de 270000 ĝis 900000 ŭonoj monate (de 300 ĝis 1000 usonaj dolaroj), sed plej ofte firmaoj, kiuj dungis ilin, pagis rekte al la nord-korea registaro, kiu subtrahis inter 70 kaj 90 procentojn de la suma gajno.

Usona laŭlanda raporto 2022 pri homaj rajtoj: Nord-Koreio, marto 2023

”

Enorma monfonto de la diktaturo

Malgraŭ sankcioj truditaj de Unuiĝintaj Nacioj Nord-Koreio daŭre sendas laboristojn al pli ol 40 landoj inkluzive de Ĉinio kaj Rusio por gajni fremdajn valutojn. Estas taksate, ke kelkaj miliardoj da usonaj dolaroj fluas en Nord-Koreion pere de tiuj laboristoj jare. En la 11-a de septembro 2017, la Konsilio de Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj aprobis rezolucion 2397 kiel parton de siaj sankcioj kontraŭ la daŭrigataj nukleaj kaj misilaj eksperimentoj fare de Nord-Koreio, malpermesante al la membro-ŝtatoj de UN akcepti novajn nord-koreajn laboristojn. En la 22-a de decembro 2017, la Konsilio de Sekureco aprobis rezolucion 2397, ordonante rehejmigon de la nord-koreaj laboristoj loĝantaj en ĉiu unuopa membro-ŝtato ene de 24 monatoj. Oni tamen taksas, ke signifa nombro de nord-koreoj estas dislokitaj kiel laboristoj en landoj kiel Ĉinio, Rusio, mez-orientaj landoj kaj Laoso.

La ŝlosila kriterio por selekti eksterlandajn laboristojn estas eventuala eblo, ke estante eksterlande ili povus peti azilon. Pro tio nuntempe estas ekskludataj de selektado ĉiu, kiu ne estas edz ⁱⁿ iĝinta, havas parencojn eksterlande, aŭ ne havas

infanojn. Diversaj institucioj pritaksas kaj esploras la kondiĉojn de eventualaj laboristoj eksterlandaj, kaj dum tiu proceduro subaĉetado ne malhaveblas.

Malliberejo senmura

Kiam selektitaj, nord-koreaj eksterlandaj laboristoj devas normale elteni multajn horojn da severa laborado. Nord-koreo, kiu ĝis 2014 laboris en Magadan, Rusio, atestis, ke laboristoj laboris 16 horojn tage. Alia nord-koreo, kiu kiel gipsisto, estis sendita al eksterlanda dungado kaj laboris de 2010 al 2017 en nord-korea eksterlanda konstru-firmao en Moskvo, Rusio, atestis, ke ili devis labori de la 8-a matene ĝis la 10-a vespere sen ajna ripozo semajnfine. La tria nord-koreo, kiu laboris kiel konstru-laboristo en Mongolio de 2016 ĝis 2019, atestis, ke ili devis labori de la 8-a matene ĝis la 10-a vespere, kaj preskaŭ ne havis tempon por ripozo krom por tagmanĝo. Krome, ne estis ferioj, eĉ okaze de festotagoj aŭ semajnfinoj.

Eksterlandaj laboristoj estas subigitaj al strikta kontrolado kaj regado fare de la nord-koreaj aŭtoritatoj dum sia atribuita laboro. La vivo de la eksterlandaj laboristoj estas gvatata de oficistoj de la Ministerio pri Ŝtata Sekureco aŭ direktoroj de nord-koreaj firmaoj, por kiuj ili laboras. La nord-koreaj eksterlandaj laboristoj vivas kolektive, kaj estas devigitaj ĉeesti en sesioj de viv-memkritiko okazigataj en iliaj pensionoj. Iliaj posedaĵoj estas priserĉataj du aŭ tri fojojn semajne, kaj ne estas permesate al ili havi poŝtelefonon. La laboristoj estas punataj aŭ resendataj hejmlanden, se ili malobeas regulojn. La plej pezan punon sekvigas aŭskultado de sud-korea radio aŭ spektado de sud-korea televido. Estas ĝenerala limigo por eksterlandaj laboristoj sole iri ekster la terenon **de la laborejo aŭ de la pensiono** kaj kontakto kun eksterlandanoj estas strikte malpermesata. Nur surlokaj direktoroj kaj interpretistoj estas rajtigitaj kontakti eksterajn personojn.

“La nord-koreaj laboristoj en ĉinaj fabrikoj estas submetitaj al intensiva laborado pli ol 12 horojn tage dum pli ol du jaroj, sen ajna kontakto kun la ekstero.”

Daily NK, februaro 2022

La nord-koreaj eksterlandaj laboristoj devas lasi signifan proporcion de sia mongajno al la nord-korea reĝimo. Aldone el ilia cetera mongajno estas deprenoj fare de iliaj superaj organizaĵoj kaj surlokaj eksterlandaj kompanioj. Nord-korea rifuĝinto, kiu laboris kiel konstru-laboristo en Rusio, atestis, ke ili devis pagi 600 usonajn dolarojn al la registaro ĉiumonate, tiel ke la laboristoj povis alproprigi al si nur 230 dolarojn monate. Alia rifuĝinto sendita al Orienta Eŭropo ĝis la unuaj monatoj de 2018 diris, ke lia monata salajro donata de la firmao estis proksimume 500 usonaj dolaroj, sed nur 150-200 dolaroj estis oficiale registritaj. Laŭ li la laboristoj kredis, ke la cetero iris al la nord-korea reĝimo.



Raspaj manoj de nord-koreaj eksterlandaj laboristoj

FONTO DE LA FOTO

Kang Dong-wan, profesoro de Universitato Dong-a

DIVERSAJ ATENCOJ AL HOMAJ RAJTOJ FARE DE LA NORD-KOREA REĜIMO

01

Militkaptitoj el Respubliko Koreio

Notante kun zorgo la asertojn pri daŭraj atencoj al homaj rajtoj de nerehejmigitaj militkaptitoj kaj iliaj posteuloj, kaj la problemon de ŝtatanoj de aliaj membro-ŝtatoj retenitaj en Demokratia Popol-Respubliko Koreio sen ajna informo havebla rilate al iliaj sanstato aŭ kondiĉoj de enprizoniĝo.

Rezolucio adoptita de la Konsilio pri Homaj Rajtoj de UN en aprilo 2023

La Interkonsento pri armistico de la Korea Milito, subskribita en la 27-a de julio, 1953, estis interkonsento, ke militkaptitoj estu senditaj hejmen. Sed estas supozate, ke konsiderinda nombro da sud-koreaj militkaptitoj estas neniam revenigita hejmlanden kaj restas retenita en Nord-Koreio. La Komandejo de Unuiĝintaj Nacioj [angle United Nations Command, UNC](#) taksas, ke proksimume 82,000 sud-koreaj soldatoj estas perditaj en batalo, sed nur 8,343 militkaptitoj estis fine senditaj hejmen. Nord-Koreio asertas, ke ĉiuj militkaptitoj estis resenditaj kaj neniu sud-korea militkaptito restas retenita kontraŭvole en Nord-Koreio. Ĝis septembro 2022, 80 militkaptitoj eskapis el Nord-Koreio kaj revenis al Sud-Koreio, kaj fuĝis ankaŭ pli ol 430 familianoj de militkaptitoj.

Laŭ atestoj de revenintaj militkaptitoj oni kredas, ke ili estis aŭ aligitaj al la Nord-Korea Popola Armeo aŭ devigataj al kolektiva laboro en minejoj, industriaj instalaĵoj, kaj en kamparo dum la korea milito. La militkaptitoj estis komence malliberigitaj en koncentrejo N-ro 25 en Chongjin sekve de la armistico kaj en junio 1956 ricevis nord-koreajn identigilojn, kio ebligis, ke ili foriru de la prizonoj kaj eniru

en la ordinaran socion. Tamen multaj estis translokitaj al karbominejoj en la regiono Hamgyong pro la fakto, ke estis pli facile kontroli kaj regi la minejojn. La militkaptitoj senditaj al laboro en la karbominejoj laboris 12 horojn tage en du skipoj, kaj oni taksas, ke iam estis de 1100 ĝis 1200 militkaptitoj dislokitaj al diversaj karbominejoj en la regiono de Norda Hamgyong.

La laboro trudita al la sud-koreaj militkaptitoj estas atenco al la Ĝenevaj Konvencioj. Laŭ la Konvencio de Ĝenevo rilate al la Traktado de Kaptitoj de Milito de la 12-a de aŭgusto 1949, Tria Ĝeneva Konvencio, militkaptitoj ĉiam devas esti humane traktataj- Artikolo 51 - kaj provizataj per taŭgaj laborkondiĉoj - Artikolo 52-. Aldone la Tria Ĝeneva Konvencio malpermesas, ke militkaptitoj okupiĝu pri laboro malutila al sia sano.

En Nord-Koreio militkaptitoj frontas subpremon kaj socian diskriminacion en sia ĉiutaga vivo pro sia familia fono **koree: songbun** . Multaj ne malkaŝas sian statuson de militkaptito zorgante, ke tio povus influi la statuson de iliaj infanoj. La infanoj de militkaptitoj renkontas malfacilaĵojn en aliĝo al la Korea Laborista Partio, strebado al alta edukado, kaj dungigo. Rifuĝintoj atestas, ke militkaptitoj ne povas aliĝi al la Korea Laborista Partio aŭ labori por la Partio, kaj eĉ se ilia akademio atingas estas tre eminenta, la infanoj de militkaptitoj ne povas esti rekomendataj por akcepto en universitato pro sia statuso.

“Ĉiuj personoj trude malaperigitaj estas sub strikta kontrolo kaj senigitaj je okazoj por edukado aŭ dungigo.”

“Blanka libro pri homaj rajtoj en Nord-Koreio 2022”, KINU, p.536

Kadre de inter-koreaj dialogoj la registaro de Respubliko Koreio ripete levis la problemon konfirmi la pluvivon de restantaj militkaptitoj kaj revenigi ilin hejmlanden. Sed estas fundamenta malfacilaĵo por trovi solvon de tiu ĉi afero, tial ke Nord-Koreio neas la ekziston de militkaptitoj. La preciza nombro de pluvivantaj militkaptitoj en Nord-Koreio ne estas konata, kaj estas supozate, ke dum retenado signifa nombro povas esti mortinta pro granda aĝo. Je decembro 2022 el kelkdek militkaptitoj, kiuj fuĝis el Nord-Koreio, oni sciis pri nur 14, kiuj vivas en Sud-Koreio.

02

Forkaptitoj en Nord-Koreio

La gvidantoj rekonfirmas sian komunan devontigon,
kiu celas la tujan solvon de la problemo de forkaptitoj.
Ĉefministro Kishida kaj prezidento Biden ankaŭ esprimas
sian subtenon al la tuja liberigo de la civitanoj de la
Respubliko Koreio retenitaj en Demokratia Popol-Respubliko Koreio.

Pnompena Deklaro pri la Partnereco inter Usono,
Japanio kaj Respubliko Koreio por la Hinda-Pacifika Regiono,
novembro 2022

La forkapto de sud-koreoj fare de la nord-korea reĝimo okazis ne nur dum la korea milito, sed ankaŭ post la subskribo de la interkonsento pri armistiko. Estas taksate, ke minimume 82 959 sud-koreaj ŝtatanoj estis forkaptitaj dum la korea milito. Post la armistiko okazis proksimume 3835 forkaptoj ekde la mezo de la 1950-aj ĝis la 1970-aj jaroj. La forkaptitoj inkluzivas fiŝistojn forkaptitajn dum fiŝkaptado en la Orienta kaj Okcidenta Maroj, pasaĝerojn de kaperitaj aviadiloj, civilulojn feriantajn, armeanojn, gardistojn de la marboda servo, kaj sud-koreojn forkaptitajn eksterlande. Inter ili 3310 sukcesis reveni al Sud-Koreio, kaj ekde 2000 naŭ personoj provis eskapi el Nord-Koreio. Je septembro 2022 estas taksate, ke 516 sud-koreoj restas retenataj en Nord-Koreio.

Iuj el la forkaptitoj estis utiligitaj kiel valoraĵoj por kontraŭ-sud-koreaj radioelsendoj aŭ por trejnado de spionoj. Je la 11-a de decembro 1969 Nord-Koreio kaperis aviadilon de la Korea Aerlinio KAL kun 4 stabanoj kaj 47 pasaĝeroj. Flugskipanoj kiel Sung Kyung-hee kaj Jeong Gyeong-suk estis misuzataj en radio-disaŭdigoj kontraŭ Sud-Koreio. Aldone multaj forkaptitoj estis devigitaj labori kiel instruistoj por trejni spionojn kaj okupiĝi pri subteraj operacoj kontraŭ Sud-Koreio. Sed forkaptitoj sen tia utiligeblo supozeble estis retenitaj en politikaj malliberejoj. En januaro 1999 la Nacia Inform-akira Servo de Respubliko Koreio rivelis, ke 22

forkaptitoj kaj memvolaj rifuĝintoj, inkluzive de Lee Jae-hwan, estas retenataj en politikaj malliberejoj.

Vundoj sangantaj

Post la enpotenciĝo de Kim Jong-un oni eksciis, ke ses sud-koreaj civitanoj estas retenataj en Nord-Koreio. La listo inkluzivas la kristanajn misiistojn Kim Jung-wook, Kim Kuk-ki, Choi Chun-kil kaj la antaŭa rifuĝinto kun poste ricevita sud-korea ŝtataneco Ko Hyun-chul. La nord-koreaj aŭtoritatoj ne rekonas la rajton de la retenataj sud-koreaj civitanoj je konsula aliro. Rezulte restas nekonfirmitaj la loko, la sanstato kaj la sekureco de sud-koreaj civitanoj nuntempe retenataj en Nord-Koreio. Ekde la interkorea pintkonferenco en 2000 la sud-korea registaro konsekvence levas al Nord-Koreio la problemon de forkaptitoj, kune kun tiu de militkaptitoj. Nord-Koreio tamen kategorie neas la ekziston de forkaptitoj kaj insistas, ke ili memvole venis al la lando.

La forkaptado de civiluloj organizata de la nord-korea reĝimo ne estas limigita nur al sud-koreoj. Ekde 1950 Nord-Koreio sisteme forkaptas eksterlandanojn kiel parton de la nacia politiko, kaj rifuzas revenigi ilin hejmlanden. La japana registaro identigis 17 japanajn viktimojn de la nord-korea forkaptado. En oktobro 2002 kvin el ili revenis al sia lando, kaj la japana registaro daŭre postulas la revenigon de la restantaj 12 personoj. Nord-Koreio tamen insistas, ke la problemo de la japanaj forkaptitoj estas jam komplete solvita, tial ke ili lasis kvin forkaptitojn reiri al Japanio, kaj la restantaj ok mortis en Nord-Koreio.

Nord-Koreio sin okupas pri retenado ankaŭ de usonaj civitanoj sen esti punata. Inter 2009 kaj 2010, usonaj civitanoj Euna Lee, Laura Ling kaj Ajalon Mahli Gomes estis arestitaj akuzite pri kontraŭleĝa eniro en la landon kaj spionado, kaj estis kondamnitaj al korekta laboro. Post la enpotenciĝo de Kim Jong-un, Kenneth Bae, korea-usona misiisto, estis kondamnita al korekta laboro akuzite pri provo renversi la reĝimon per religiaj aktivecoj. Li suferis pro ekstrema fizika laboro kaj subnutrado pro maladekvataj manĝoj donitaj en la koncentrejo, rezulte perdinte pli ol 20 kilogramojn. En 2015 la usona universitata studento Otto Warmbier vizitis Nord-Koreion kaj estis arestita. Li estis juĝita en la 22-a de januaro 2016, kun

kondamno de 15 jaroj da korekta laboro. La 6-an de junio 2017 li revenis al Usono en vegeta stato kaj mortis ses tagojn poste.

Laŭ raporto de la Esplorkomisiono de UN pri Homaj Rajtoj en 2014 estas taksate, ke la nombro de homoj trude malaperigitaj de Nord-Koreio, inkluzive de infanoj, superas 200 000 tutmonde. Plimulto de tiuj truditaj malaperoj estis plenumitaj de la nord-koreaj aŭtoritatoj kun la celo ekspluati la laboron kaj lertojn de la viktimoj, dum iuj viktimoj devis trudi sin okupi pri spionaj kaj terorismaj aktivecoj. Virinoj forkaptitaj el Eŭropo, Meza Oriento, kaj Azio estis ankaŭ devigitaj edziniĝi kun viroj el aliaj landoj. La forkaptado de civiluloj fare de la nord-koreaj aŭtoritatoj ne nur estas atenco al rajtoj de la koncernaj individuoj sed ankaŭ konsistigas gravan kriman agon.



Megumi Yokoya (Japanio)



Anocha Panchoi (Tajlando)



Kim Jung-wook (Sud-Koreio)



Kim Kuk-ki (Sud-Koreio)



Choi Chun-kil (Sud-Koreio)

Warmbier, usonano,
estis detenita en Nord-Koreio
dum 17 monatoj ekde januaro 2016
akuzite pri provo ŝteli politikan propagandajon.
Li tragike forpasis en junio 2017.

FONTO DE LA FOTO
"Korea Centra Novaj-agentejo"
2016. 2. 29



03

Disigitaj familioj

“

Por sud-koreoj la homoj en Nord-Koreio ne estas simple 'iuj homoj'.

Milionoj da sud-koreoj havas familianojn kaj parencojn

vivantajn en la Nordo. Eĉ se ni neniam aŭdas ion de ili,

eĉ se ĝis nun la doloro de la disiĝo fariĝis frida fakto de la vivo,

ni scias, ke ili estas nur kelkcent kilometrojn for de tie, kie ni vivas.

On Joon, eksa ambasadoro de Respubliko Koreio ĉe UN, decembro 2014


”

Sur la korea duoninsulo sin trovas disigitaj familioj, kiuj estis disŝiritaj inter Sud-kaj Nord-Koreioj pro diversaj kialoj kiel la divido de la duoninsulo, forkapto al Nord-Koreio, ne-rehejmigo de militkaptitoj kaj retenado en Nord-Koreio. Tiuj disigitaj familioj estas senigataj je sia rajto je rekuniĝo de familio, malgraŭ la fakto, ke tiu rajto estas protektata de internacia humanitara juro. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj internaciaj traktatoj pri homaj rajtoj asertas, ke viroj kaj virinoj de edz ⁱⁿ iĝkapabla aĝo havas la rajton edz ⁱⁿ iĝi kaj fondi familion, kaj ŝtatoj havas devon protekti la familion.

Persistas la divido de Nord- kaj Sud-Koreioj, tiel ke maljuniĝas la unua generacio de disigitaj familioj, kaj rapide kreskas la nombro de tiuj, kiuj forpasis. Je la 30-a de aprilo 2023 la nombro de homoj, kiuj registris sian deziron por inter-korea familia rekuniĝo estas 133678. Inter la registrintoj estas 41423 personoj, kiuj vivas, sed 92255 personoj forpasis atendante renkonti siajn familianojn. Inter tiuj, kiuj ankoraŭ vivas, 12979 aĝas 90 jarojn aŭ pli, tio estas 31.3%, kaj 14867 aĝas 80-90 jarojn, tio estas 35.9%. Tio montras, ke homoj de 80 jaroj aŭ pli konsistigas 67.2% de la nunaj vivantoj. Ilia tempo rapide elĉerpiĝas.

La sud-korea registaro klopodas solvi la problemon de disigitaj familioj per interparoloj de Norda kaj Suda Ruĝaj Krucoj kaj interministraj kunvenoj, sed manko de respondoj el la norda flanko malhelpas la traktadon de la problemo. En septembro 2022 Kwon Young-se, ministro pri reunuiĝo, proponis al Nord-Koreio interregistarajn interparolojn pri la problemo de disigitaj familioj, sed Nord-Koreio rifuzis akcepti la leteron.

La nord-koreaj aŭtoritatoj klasifikas kaj regas siajn civitanojn metante ilin en tri kategoriojn; temas pri la "baza" amaso, la "kompleksa" amaso kaj la "restaĵo de la malamika klaso". Disigitaj familioj en Nord-Koreio estas klasifikataj kiel "perfiduloj, kiuj fuĝis al Sud-Koreio" aŭ "familianoj de perfiduloj, kiuj fuĝis al Sud-Koreio" kaj traktataj kiel "kompleksa amaso". Tiuj, kiuj estas klasifikataj kiel "kompleksa amaso" frontas diskriminacion en la socia vivo, kiu gamas de dungiĝo al edukado, loĝado kaj militservo. Ili ne povas aliĝi al la Korea Laborista Partio aŭ servi en la armeo, kaj ili ankaŭ spertas sociajn diskriminaciojn en tiaj aspektoj kiel eniro en universitaton aŭ geedziĝo. Iu nord-korea rifuĝinto atestis, ke se oni naskiĝis en familio, kies familiano fuĝis al Sud-Koreio, aŭ estis permesita reheimiĝi pro interŝanĝo de militkaptitoj, oni eĉ ne povas revii pri posteno de altranga funkciulo, kaj precipe por virinoj la maksimumo, kiun oni povas esperi, estas laboro en fabriko. Familioj, kies membro fuĝis al Sud-Koreio, fariĝas celoj de daŭra kontrolado fare de la nord-koreaj aŭtoritatoj. Nord-korea rifuĝintino, kiu fuĝis al Sud-Koreio en 2016, atestas, ke post kiam, pere de serĉado de disigitaj familioj, iĝis konate, ke ŝia avo loĝas en Sud-Koreio, ŝi estis daŭre submetita al strikta kontrolado kaj regado dum la daŭro de dek jaroj, ĝis ĉio fariĝis ne plu tolerebla, kaj ŝi decidis fuĝi.



“Dum aranĝo por familia rekuniĝo por disigitaj familioj mi renkontis mian onklinon el Sud-Koreio ĉe la Hotelo Monto Kumgang. Post tio anoj de la Sekureca Servo ofte vizitis nian hejmon, tiel ke nia vivo fariĝis ne eltenebla. Ankaŭ la Popola Unio metis nin sub kontroladon. Mia frato, kiu antaŭe laboris en la armea elektrokompanio, estis maldungita dek tagojn poste.”

“Raportoj pri Homaj Rajtoj en Nord-Koreio 2023”

Ministerio pri Unuiĝo de Respubliko Koreio, p.444



FONTO DE LA FOTO
"Nocutnews", 2018. 8. 20

Voĉoj de la Senvoĉuloj

Senvualigi la realon de homaj rajtoj
en Nord-Koreio

03

KLOPODOJ DE LA INTERNACIA KOMUNUMO

PLIBONIGI LA
SITUACION DE
HOMAJ RAJTOJ
EN NORD-KOREIO



Voçoj
de la
Senvoçuloj

3 Klopodoj de la internacia komunumo

plibonigi la situacion de
homaj rajtoj en Nord-Koreio

La membro-ŝtatoj de UN devas daŭre subteni la solvado de
la situacio de homaj rajtoj en Demokratia Popol-Respubliko Koreio,
aparte per esplorado de rimedoj por subteni la
laborojn de Ne-Registaraj Organizaĵoj,
kiuj pledas por la rajtoj de virinoj.

Elizabeth Salmón, speciala raportanto de UN
pri la situacio de homaj rajtoj en DPRK, aprilo 2023

La internacia komunumo seninterrompe esprimas sian profundan zorgon pri la severeco de la atencoj al homaj rajtoj en Nord-Koreio, kaj alvokas al la nord-korea reĝimo plibonigi homajn rajtojn de nord-koreoj. La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj aprobas rezoluciojn pri homaj rajtoj en Nord-Koreio dum 18 sinsekvaj jaroj ekde 2005, la Konsilio pri Homaj Rajtoj de UN aprobas rezoluciojn pri la sama temo dum 21 sinsekvaj jaroj ekde 2003. Pere de tiuj rezolucioj la internacia komunumo aŭdigas fortan zorgon pri la seriozaj atencoj al homaj rajtoj en Nord-Koreio. Klopodoj estas farataj por igi la atencintojn preni respondecon, kaj pluraj landoj utiligas levilforte sankciojn kontraŭ Nord-Koreio por forte urĝi la landon plibonigi la situacion de homaj rajtoj. Nuntempe libera fluo de informoj en

FONTO DE LA FOTO
UNHCR homepage
(www.unhcr.co.kr)



Nord-Koreion estas emfazata kiel kerne grava rimedo por plibonigi homajn rajtojn de nord-koreoj. La afero de kontraŭvola disigo de familioj, kiel disigitaj familioj kaj retenitoj, estas rekonata kiel atenco al homaj rajtoj kaj menciata kiel problemo, kiu devas esti traktata el vidpunkto de homaj rajtoj.

En 2004, konforme al rezolucioj de la Komisiono de UN pri homaj rajtoj, Unuiĝintaj Nacioj starigis la postenon de Speciala Raportanto de UN pri Homaj Rajtoj en Nord-Koreio, kies tasko estas esplorado pri la situacio de homaj rajtoj en la lando kaj raporti la rezulton al la Ĝenerala Asembleo de UN kaj la Konsilio pri Homaj Rajtoj. En aŭgusto 2022 Elisabeth Salmón estis nomumita kiel la 4-a Speciala Raportanto de UN pri Homaj Rajtoj en Nord-Koreio. En marto 2013 la Konsilio pri Homaj Rajtoj de UN starigis la Esplorkomisionon de UN pri Homaj Rajtoj en Demokratia Popol-Respubliko Koreio konforme al sia rezolucio. En junio 2015 estis malfermita en Seulo oficejo de la Alta Komisionestro pri Homaj Rajtoj de UN. Klopodoj de UN rekte rilatas al la laboro de respondeco pri la atencoj al homaj rajtoj en Nord-Koreio. Precipe la supre menciita Esplorkomisiono per sia raporto publikigita en februaro 2014 emfazis, ke fare de Nord-Koreio estas vastskalaj kaj seriozaj atencoj al homaj rajtoj, kaj klare konstatis rektan respondecon de la nord-koreaj aŭtoritatoj. Ĝi plie menciis la kriminalan respondecon de la nord-korea supera gvidanto Kim Jong-un.



FONTO DE LA FOTO

Retejo de Centro por Strategiaj kaj Internaciaj Studoj

(www.csis.org/events/north-korean-human-rights-and-international-cooperation-forward-after-un-commission)

La okcidentaj ŝtatoj inkluzive de Usono plifortigas sankciojn kontraŭ nord-koreaj institucioj kaj individuoj, kiuj okupiĝas pri atencoj al homaj rajtoj de nord-koreoj. Tio celas instigi substancan plibonigon de la stato de homaj rajtoj en Nord-Koreio. Usono trudas sankciojn al nord-koreaj atencintoj de homaj rajtoj per la 'Leĝo pri sankcioj kaj plifortigo de politiko kontraŭ Nord-Koreio' kaj 'Ekzekutiva ordono 13722', ambaŭ ekvalidigitaj en 2016; Britio ekvalidigis la 'Leĝon pri sankcioj kaj kontraŭ monlavado' en 2018 kaj la 'Regularon pri sankcioj por homaj rajtoj tutmonde' en 2020, dum Eŭropa Unio aprobis la 'EU-reĝimon pri sankcioj por homaj rajtoj tutmonde' en 2020.

Nord-Koreio konsideras liberan fluon de eksteraj informoj trans siajn landlimojn kiel seriozan minacon al sia aŭtoritatisma reĝimo kaj strikte regas kontaktojn de nord-koreoj kun eksteraj informoj. La internacia komunumo rekonas tion kaj emfazas gravecon de neregata fluo de informoj al la nord-korea loĝantaro kiel vojon por plibonigi la situacion de homaj rajtoj en Nord-Koreio. Por trakti la problemojn de homaj rajtoj en la lando, Usono alprenis la "Leĝon pri Homaj Rajtoj en Nord-Koreio" en 2004, kaj revalidigis ĝin trifoje en 2008, 2012 kaj 2018. Per tiu ĉi leĝo Usono pligrandigas financon subtenon al civilaj organizaĵoj, kiuj agadas por enfluo de informoj kiel radio-disaŭdigoj al Nord-Koreio. Plie en decembro 2022 Usono ekvalidigis la 'Leĝon Otto Warmbier kontraŭ la nord-koreaj cenzuro kaj kontrolado de 2021', kiu antaŭenigas liberecon je informoj en Nord-Koreio kaj reagon al cenzuro kaj kontrolado por pligrandigi enflon de liberaj informoj en Nord-Koreion.

En la Ĝenerala Asembleo de UN kaj ĝia Konsilio pri Homaj Rajtoj la problemoj de disigitaj familioj ricevas emfazon kiel urĝa kaj grava afero kaj estas konsiderata el la perspektivo de atencoj al homaj rajtoj. En decembro 2022 Usono ekvalidigis Leĝon pri rekuniĝo de disigitaj familioj", kiu leĝe kondiĉas kunlaboron kun la sud-korea registaro por havigi al disigitaj korea-usonaj familioj okazojn por rekuniĝoj inkluzive de tiuj per video. UN montras signifan interesiĝon pri problemoj kiel tiuj de militkaptitoj kaj aliaj retenitoj ekde la enpotenciĝo de Kim Jong-un. La rezolucio de la Ĝenerala Asembleo de UN pri homaj rajtoj en Nord-Koreio en 2021 esprimis

zorgon pri la atencoj al homaj rajtoj de ne-rehejmitaj militkaptitoj por la unua fojo, kaj ĝi rekomendas al Nord-Koreio, subskribinto de la Viena Konvencio, certigi la rajtojn de retenitoj ene de siaj landlimoj inkluzive de konsula aliro al retenitoj.

Michael Kirby

Esplorkomisiono de UN
pri Homaj Rajtoj en DPRK -
dum gazetara
konferenco

Ĝenevo,
la 17-an de februaro 2014



Elizabeth Salmón

Speciala raportanto
pri la situacio de
homaj rajtoj
en Demokratia
Popol-
Respubliko
Koreio





Voĉoj de la Senvoĉuloj

Senvualigi la realon de homaj rajtoj
en Nord-Koreio

Por pli da informoj pri la homaj rajtoj en Nord-Koreio
bonvolu viziti nian oficialan paĝaron
www.kinu.or.kr

Voĉoj de la **Senvoĉuloj**

de
Senvidligi la realon de **homej rajtoj**
en **Nord-Koreio**

